

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

November 1946

34 årg. Nr 11

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET



EK AL LABOR'

Imitinda estas la ekzemplo de la esperantistoj en Skövde, Vestrogotio, Svedlando. Ili kolektis siajn "hobianojn" inter la membroj de la klubo kaj devigis ilin skribi pri siaj hobioj. La skribaĵojn oni montris al gazetoj, kiuj kaŭze de tio faris intervjuojn kun la skribintoj, kiuj kaptis la okazon rakonti, kiamaniere esperanto povas esti uzata por la koncerna hobia: kolektado, korespondado, studado ktp.

Vortoj al la instruistaro!

Nia movado bezonas la junularon. Por la junularo mem estas necese lerni lingvojn, ĉar la nuntempa mondtrafiko, internacia aktiveco en ĉiuj medioj postulas lingvoscion. La ideala lingvo Esperanto sekve devas esti instruata al la junularo.

En la centro de la sveda junularmovado esperantista ni urĝe bezonas aktivan helpon flanke de la instruistaro. Ĉu vi, esperantistoj/geinstruistoj estas pretaj helpi nin kaj tiel akceli nian aferon. Vi, edukantoj kaj gvidantoj de la junularo, certe volas sukcesigi la antaŭenmarŝadon de Esperanto en la junularajn rondojn. Tiamaniere vi faras gravegan servon kaj al Esperanto kaj al la junularo. Unuvorte dirite: Vi faras vian devon sur la kampo kultura.

Tuj, nun en novembro startu kursojn ĉie en Svedujo, kie estas esperantistoj inter la geinstruistaro. La lerneĵaj aŭtoritatoj estas facile venkeblaj, se vi sekvas prudentan metodon, kiam vi prezentas viajn dezirojn. Skribu volonte al SEF (Junulara sekcio), kiu disponigas al vi kompletan kolekton de proponoj, temantaj pri Esperanto en la popola lernejo.

Agu! Nun estas jam tempo. En novembro 1946 komenciĝos nova, bona infankurso ĝuste en via loko! Ni fidus je vi...

"Junul'"

NIA VOJO

Nia forto ne estas impona. Nur en kelkaj landoj la cirkonstancoj permesas al la esperantistoj agi amplekse kaj racie. Ni svedoj staris flanke de la teruraj okazintaĵoj. La baritaj limoj estis malhelpo por nia internacia komunikado. Krome multaj el la fervoraj agemuloj pro militistaj okupoj ne kapablis agi kiel kutime. Kaj la homoj ne interesis sin pri tiel supertera afero kiel internacia helplingvo.

Sed la fakto, ke ni svedoj nek korpe nek anime, nek individue nek tute estas detruitaj, ke ni estas preskaŭ netuŝitaj de la frostaj mortventoj de la milito metas nin en specialan situon. Svedujo havas devojn, kiujn ni devas observi. Kaj la observado agigu nin!

Ni trovas, ke la jam konstatita vero hodiaŭ vivas pli aktuala ol iam: la homaro baraktas en la marĉo de la multlingveco. La bezono de internacia helplingvo estas sentata ne nur dum la konferencoj de la potenculoj sed ankaŭ de ni simpluloj, kies celo kaj sopiro estas kunlaboro kaj interkompreno.

Ni estas devigataj labori. Kaj kiel la sveda esperantistaro agu? Neeble doni tute kontentigan respondon, sed tio ne igu nin resti senmovaj antaŭ la problemoj.

Al mi ŝajnas, ke unu el la irindaj vojoj estas la laboro inter la infanoj. Por tiu laboro ni bezonas la kunagon de la geinstruistoj. Do unue ni traserĉu la landon por kapti nun aktivajn kaj pli frue aktivajn geinstruistojn. Ilin ni devigu ekinteresiĝi pri instruado de esperanto en la lernejoj. Tio estas la devo de esperantokluboj kaj izolaj esperantistoj. Ili koncentru la intereson al propagando inter geinstruistoj. Tiel ni kreos reton de esperantoinŝuletoj sur la vasta lerneja maro. Ni bezonas tiujn praktikajn pruvojn de vivanta esperanto, se SEF aŭ la Instituto povos kun bona rezultato ataki la pintojn de la lerneja organizacio.

Alia ne malpli grava tasko estas, ke niaj gvidantaj institucioj venontsomere arangŭ kursojn por geinstruistoj — kaj por komencantoj kaj por tiaj, kiuj volas progresi. Mi kredas, ke estos eble havigi la apogon de la ŝtato kaj ankaŭ kunlabore kun instruistaj asocioj starigi semajnokursojn.

La laboro inter la instruistoj kaj sur la lerneja kampo ne donos tujan rikolton, sed tamen tiu laboro havas la signon de la estonteco, ĉar ĝi tuŝas la kreskantajn generaciojn, kiujn ni absolute devas vekti kaj kapti, se ni volas, ke nia esperanta laboro ne fariĝu senfina kursado ĉi tie kaj tie sen ebleco vidi la finon de la klopodoj

HAR VI NÅGOT ATT LÄRA AV USA?

Medan en hel del svenskar ser ner på esperanto och talar myndigt om engelskan som världsspråk, vinner esperanto terräng på den amerikanska kontinenten och användes av amerikanska firmor för affärer etc. Jag vill erinra om, att Kanadas största handelshögskola använder esperanto och att dess direktör Fenton är esperantist.

Genom det nyss bildade Tutmonda Esperantista Journalista Asocio har jag kommit i förbindelse med redaktör Preston Davis Jr, chef för Esperantoavdelningen inom **American Education Press, Inc.**, 400 South Front Street, Columbus 15, Ohio, USA. Detta stora och mäktiga skolboksförlag, som under 44 år regelbundet förtsett de amerikanska skolorna med engelskspråkigt undervisningsmaterial, har särskild esperantoavdelning och egen redaktör för denna.

American Education Press utger regelbundet skoltidningar av olika typer. Varje vecka kommer sålunda tidningar för sex olika klasser av de lägre skolorna och tidningar för de högre skolorna. Dessa behandlar neutralt världssituationen, politik o. d., vetenskap och aviatik. Och ständigt utsändes nya intressanta läseböcker i olika ämnen, rikt illustrerade.

Jag dristar mig slå ett litet slag för engelska genom att påpeka, att lärare-esperantister, som kanske undervisar i engelska, skulle kunna genom att på esperanto söka kontakt med hr Preston Davis Jr, få god hjälp av det material, som ges ut där borta. Det är därför jag uppmärksammar på saken här och samtidigt för att visa, att ett så omfattande företag, som detta, använder esperanto i avsikt att få kontakt med förlag och lärare i den övriga världen. Och man agiterar för esperanto. Vilken svensk skolboksfirma skulle kunna ens tänka sig den möjligheten? Jag bara frågar...

I nr 35 för i år av skoltidningen Our Times finns en lång artikel om esperanto: "Should we use an International Language?". Intressant är följande jämförelse, som göres i syfte att polemiserar mot Basic English:

Engelska	Basic English	Esperanto
appear	come to light	aperi
stop	come to a stop	halti
consent	come to an agreement	kunsenti
find	come across	trovi
happen	come about	okazi
succeed	come through	sukcesi
intelligent	wise	inteligenta
phantom	sande, or fiction	fantomo
to exile	put out	ekzili
cooperate	give support	kunlabori
equator	line of division between north and south given on a map of the Earth.	ekvatoro.

Bara ordlistan är en kraftig agitation mot Basic English. Såg vi något liknande i en svensk skoltidning? Men i USA läses detta i en tidning, som går ut bland skolbarnen i miljonupplagor. Och där heter det om esperanto bl. a.:

"Best of all, no one who speaks Esperanto feels

that he is speaking a foreign language. Since the pronunciation of Esperanto is perfectly regular and it has no tricks of idiom, every Esperantist can understand any other Esperantist without difficulty, even though they come from opposite ends of the earth. The language belongs to no particular national or cultural group. It belongs equally to all."

Detta behöver väl inte översättas, ty vid detta lag kan väl varannan svensk läsa det, om vi tar hänsyn till den mängd kurser, som här pågått och pågår i engelska. Men medan vi lär oss engelska agiterar amerikanare för esperanto och använder det. Och ett engelskspråkigt förlag agiterar för esperanto bland skolbarnen. Detta är kanske anledningen till, att vi gång efter annan kan läsa om esperantokurser inom amerikanska läroverk och högskolor.

Sedan barnen läst den åberopade artikeln får de ett antal frågor uppställda, att skriftligt besvara. Där får de redogöra för esperantos fördelar framför nationalspråken etc. Frågorna är uppställda i tidningen. Kanske har vi något att lära av amerikanerna?

Einar Adamson.

Esperanto-laboro en Karlskoga.

Ankaŭ ĉijare la kluba laboro dum la somero celis al bona rezulto koncerne la aŭtunajn kursojn en la urbo. Jam antaŭ du monatoj la "Lingva sekcio" sub gvidado de s-ano R. Lindahl komencis plani por la kurslaboro. La rezulto estiĝis, ke kvin apartaj kursoj estis anoncataj, nome unu komenca, unu komenca junula, unu komenca por infanoj de la popollernejo, unu daŭriga kaj unu konversacia. Krom tiuj, s-anoj Blanck kaj Härdig aranĝis kaj gvidas kursojn komencajn en la du urbopartoj Aggerud kaj Bråten.

La infankurso estas aranĝita en intima kunlaboro kun la ĉefinstruistino, fraŭlino Jonsson, kiu prizorgis la disdonadon de la speciale faritaj aligiloj por la infanoj. Kiel instruistoj por la diversaj kursoj funkcias s-ino G. Tistad (daŭriga), s-ro E. Bonander (komenca), pastro S. Bergström (junula), s-ro R. Lindahl (infankurso) kaj s-ro A. Bern (konversacia). Entute 90 homoj partoprenas la kursojn.

Ĉiuj kursoj estas raportitaj al ABF, kiu pagas la lukostojn kaj ankaŭ donas honorarion al la gvidantoj.

La 20-an de okt la ekzamena komitato prizorgis du ekzamenojn, unu elementan kaj unu superan. La du ekzamenitoj estas s-ro Stig Norstedt (16-jara) kaj ing. Yngve Lidbo. Do ankaŭ kvalite la klubo altiĝas.

Ankaŭ de la "Ekonomia sekcio" venas raporto pri rezultoplena laboro. Kiel kutime dum la lastaj jaroj ankaŭ ĉijare la sekcio organizis loterion por havigi monon al la kluba kaso. En la fino de sept la sekcio decidis pri 5000-krona loterio kun motorciklo kiel premio. La gubernia estraro permesis la loterion, kaj la lotoj estis presataj kaj la vendadon oni komencis. Post 14 tagoj jam 4000 lotoj estis venditaj kaj nunefektive ĉiujn oni forvendis. Prefere ni mencias la plej viglan vendinton, s-ron Gustavsson, kiu mem vendis pli ol 1000 lotojn. Ni dankas pro bona laboro! En la laboro por la loterio nia vigla junulara klubo efike kunhelpis. Do la s-anoj faris modelan kluban laboron, kaj la afero estas honega gajno, pri kiu la kasisto estas vere kontenta. Krom la gajno de la loterio la kluba kaso ricevis proksimume 200 kr. en formo de mon-donacoj de diversaj homoj en la urbo.

La "Red. sekcio", por kiu respondas s-ano A. Leijder, raportas, ke dum la propaganda laboro 10 artikoloj pri Esp. aperis en la gazetoj de la urbo. Pluraj

E j e.

La plenkreskulojn ni interesigu, ni agitu inter ili, ni aranĝu kursojn por ili, ni kun danko akceptu ilian helpon. Sed mia konvinko estas, ke la plenkreskuloj ne estas la garantio, kiun ni bezonas. Afero, kiu havas siajn radikojn en la koroj de la infanoj kaj junuloj, portas venkoĉapon. Tiu fakto ĉiam staru antaŭ ni. Ni agu laŭ tio. Nur tiam ni rajtas atendi la verajn kaj signifoplenajn rezultatojn.

KREI FAKTERMINAROJN AŬ MALPROGRESI.

La demando pri eldono de fakterminaroj estas urĝa, ĉar tiaj helpiloj estas kondiĉo por apliko de esp. sur diversaj kampoj de homa agado. Sen tio esperanto ne povas plene progresi, kompare al tio multaj aferoj en la esperantolaboro estas sufiĉe negravaj kaj por tio niaj plej bonaj cerboj devas sin dediĉi per tuta energio. La pioniran laboron de IEL sur tiu kampo oni apenaŭ povas tro alte taksi.

La IEL-terminaroj.

De 1939 IEL (Internacia Esperanto-Ligo) ĉiujare eldonas fakan terminaron en sia jarlibro (dua parto krom en 1939). La terminaroj estas elementaj kaj plejparte kreitaj de angloj. Dum la milito internacia kunlaboro pri vortaroj estis preskaŭ nebla, kaj tiuj terminaroj tial kompreneble ne havas dezirindan bazon de internacico. Foje oni konstatas uzon de nenecesaj anglodevenaj neologismoj. Sed la eldonantoj ne pretendas, ke la terminaroj estu oficialaj, nur ke ili forigu la katastrofan mankon de fakterminaroj. En la sekva tabelo estas montrataj la ĝisnunaj IEL-terminaroj kun indiko de aŭtoro kaj proksimuma nombro de terminoj.

- 1939 Fervoja terminaro, Rosher (200)
- 1940 Armea terminaro, Durrant (500)
- 1941 Aeronautika terminaro, Durrant (400)
- 1942 Terminaro por infan-ludoj, Societo de britaj geinstruistoj (250)
- 1943 Radio-terminaro, Venture (600)
- 1944 Muzika terminaro, Butler-Merrick (1000?)
- 1945 Filatela terminaro, Scott (300)

En kvar el ili la terminoj estas aranĝitaj laŭ faka ordo, en la tri ceteraj laŭ tute alfabeto ordo. En ĉiu terminaro krom la filatela estas kelkaj klarigaj bildoj.

La fervoja terminaro pritraktas ĉefe nur konstruadon de fervojoj. Kelkaj rimarkoj: certa necerteco pri transitivaj kaj netransitivaj formoj, **ambaŭ** — kaj, **administrarjto**. Neologismoj estas indikitaj per steleto, tamen ne konsekvenca.

Kontraŭ la armea terminaro mi nur havas la rimarkon ke **Blokhaŭzo** devus havi steleton, montrantan ke la vorto ne troviĝas en Plena Vortaro.

En la aeronautika terminaro oni uzas la vorton **floti** kun la sama signifo, kian havas **flosi** (ankaŭ en la sekva terminaro). Ĉu la novkreita vorto estas necesa? Oni donas anglan tradukon de ĉiu termino.

La terminaro por infanludoj povas servi ne nur kiel leksikono, sed ankaŭ kiel gvidlibro uzebla ekzemple de esperantokluboj. Tamen la priskriboj de la ludoj ne ĉiam estas kompletaj.

En la radioterminaro mi anstataŭ la vortoj **batricevado** kaj **disipajo** preferas la vortojn **interfera ricevado** kaj **perdo**. **Brodkasto** estas nenecesa sinonimo al (radio)dissendo. **Malŝarĝolampo** havas pli vastan signifon ol **neonlampo**, sed ankaŭ en la sveda lingvo oni bedaŭrinde emas nomi ĉiujn lumtubojn neontuboj sen depende de uzata gaso. Oni metas egalsignon inter la vortoj **kondukemo** kaj **konduktanco**, sed mi preferas, ke oni rezervu la vorton **kondukemo** por la specifa eco de la materialo, same pri rezistemo kaj rezistanco.

La muzikan terminaron oni en alta grado dividis en

artikoloj aperis ankaŭ en diversaj gazetoj de la gubernio. Krom la gazetartikoloj ankaŭ afiŝoj kaj flugfolioj estis uzataj en la propagando por la kursoj.

Finfine ni ne povas cedi la okazon admoni la federacian estraron kaj la klubojn ĉie en la lando organizi loteriojn por havigi monon necesan por la esperantolaboro. Se vi bezonas helpon kaj informon, skribu al la prez. de nia "Ekonomia sekcio", s-ro A. Bern, Brögårdsgatan 45, Karlskoga.

Red. sekcio.
A. L. & R. L.

partojn laŭ faka ordo, kaj tio certe faciligas la difinadon, sed nefakulo malfacile trovas deziratan vorton. En tia kazo aldono de alfabeto listo estas dezirinda.

La filatela terminaro aperis en Heroldo jam en 1926. Nun ĝi estas tamen kompletigita. Krom difinoj en esperanto la listo enhavas tradukojn en angla, franca kaj germana lingvoj.

Tri aliaj terminaroj.

Pri tri aliaj fakterminaroj, kiujn mi ĝuste nun disponas, mi volas skribi kelkajn vortojn. La **Maŝinfaka vortaro** de Wüster aperis jam en 1923. Ĝi enhavas proksimume 3000 terminojn en esperanto kaj la germana lingvo. La du lingvoj troviĝas en apartaj partoj de la libro, kaj oni venas de unu lingvo al alia per ciferecindikoj. Por ordinara uzo tia aranĝo ne estas praktika ĉar oni devas foliumi duoble. La intenco verŝajne estis, ke oni povu facile aldoni aliajn lingvojn.

La **Internacia elektroteknika vortaro** de Internacia Elektroteknika Komisiono jam ricevis grandan publikacion en la esperanta gazetaro. Ĝi aperis en la jaro 1938 kaj estas seslingva: franca — angla — germana — hispana — itala — esperanta. La difinoj estas en la franca kaj angla. La vortaro estas aranĝita laŭ tute faka ordo (eĉ en la diversaj sekcioj la vortoj ne venas alfabeto). Ĉiu termino (entute ĉ. 2000) havas sian numeron, kaj ĉar ekzistas alfabeto registro en ĉiuj lingvoj la trovado de vortoj estas facila. En la libro preseraroj abundas, ankaŭ en la esperanta parto. El la esperantovortoj multaj nun certe bezonas prilaboron. Kompilante la vortaron oni ja devis inventi la plej multajn esperantoesprimojn. La vortaro ne plu estas havebla ĉe la eldonintoj.

Dum la milito (1941) aperis en Nederlando **Lumigteknika vortaro**. Ĝi enhavas 850 terminojn en la lingvoj nederlanda, germana, angla, franca kaj esperanta, krome difinojn kaj notojn en la nederlanda. Ankaŭ ĉitie la numeritaj terminoj sekvas laŭ faka ordo, kaj apartaj alfabetaj listoj faciligas trovadon. Papero kaj preso estas bonegaj, kaj evidente la libro estas zorge elleborita. Ankoraŭ mi ne trovis iun dubindan esperantoterminon en la libro. Entute oni devas varme gratuli la nederlandajn esperantistojn, ke oni akceptis esperanton en tia grava oficiala vortaro. Ĝin eldonis De Nederlandsche Stichting voor Verlichtingskunde, Utrechtscheweg 210, Arnhem. Sur la lumigteknika kampo mondvaste brilas la nomo de la nederlanda firmo Philips. Tio eble parte kaŭzis eldonon de la vortaro.

Kiel daŭrigi?

Unue mi volas al IEL esprimi sinceran dankon por la ĝisnunaj terminaroj, kaj mi deziras al IEL ke ĝi ne laciĝu sed daŭrigu persiste la laboron eldoni ĉiujare novan elementan fakvortaron. Ili similas pluvon sur seka kamparo. Kompreneble ni volas iom post iom eldoni dikajn fakvortarojn, sed mi volas forte substreki, ke la plej urĝa afero estas eldoni kiom eble plej baldaŭ elementajn terminarojn kaj ne atendi 10—20—30 jarojn, ĝis oni havos materialon pretan por kompletaj tiaj.

Nun post la milito la internacia kontakto denove estas ebla, kaj ni esperu, ke la nun baritaj limoj baldaŭ malfermiĝos plene. Por la terminara laboro tio signifas pli internacian bazon. Ni jam aŭdis ĝojigajn signalojn pri nova eldono de Plena Vortaro. Certe la Akademio kun Lingva Komitato kaj subkomitatoj povas servi kiel centro por fakterminaroj, sed mi kredas, ke la teknikistoj devas organizi sin por mem prizorgi parton de la laboro, almenaŭ fakulan kritikon de vortproponoj. Mi deziras, ke oni en la kadro de IEL kreu fakan sekcion por tekniko kaj scienco, kaj ĝia tasko estu i. a. lingva. Krome sur la programo staru teknika revuo, fakkunvenoj dum kongresoj ktp.

32-a Universala Kongreso de esperanto

Berno, 26-a Julio—2-a Augusto 1947.

La Universala Kongreso de Esperanto 1947 okazos en Bern (Svisujo) 26/7—2/8.

La kongres-kotizoj estas fiksitaj de IEL. Ili estas (en svisaj frankoj) 25 ĝis la fino de la nuna jaro, 30 ĝis la fino de Marto, kaj 35 poste. Por edzinoj kaj junuloj estas malaltigitaj kotizoj.

En la komenco de Novembro aperos la unua numero de la kongresa gazeto "Svislando vokas vin". Havigu ĝin al vi skribante al 32-a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, Bern, Schweiz.

Informoj pri la restado en Berno.

Denove okazos la Universala Kongreso de Esperanto en la plej vigla turist-sezono. Tial rilate ĉambrojn kaj nutradon estas certaj malfacilaĵoj. Pro tio la Loka Kongresa Komitato devis, nevolonte, fiksi la aranĝon de la restado kaj la nutrado kune por la tuta tempo de la 26-a Julio vespere ĝis la 2-a Aŭgusto posttagmeze. La aranĝo rilatas al ĉambro, matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo kaj trinkmono kaj ĉe la hoteloj ankaŭ transporto de la pakajoj.

A. Hotelĉambroj:

Estas nur tre malmultaj ĉambroj, kiuj estos ĉe nia dispono. Tiuj estos dividitaj en 3 kategorioj:

Kategorio I	Luksa klaso por 8 tagoj	.. Sv. fr. 205.—
Kategorio II	Komforta klaso por 8 tagoj	„ 155.—
Kategorio III	Modesta klaso por 8 tagoj	„ 130.—

Estos eble disponigi hotelĉambrojn nur al decidita grado kaj nur al tiuj, kiuj plej frutempe mendas kaj antaŭpagos.

B. Ĉambroj ĉe privatuloj:

En kolektiva prezo, kiu valoras por 8 tagoj estas en-kalkulitaj: ĉambro, maten-, tag-, kaj vespermanĝo. Multaj tre bonaj bernaj restoracioj estos je la dispono laŭ deziro kaj elekto. La prezo en tiu aranĝo estos sv. fr. 120.—.

C. Amas-restejo:

Ĉe nia dispono estos plur-centoj da litoj en lernejoj kaj kazernoj. Restejo kun servado kaj nutrado en bona berna restoracio laŭ propra elekto (maten-, tag- kaj vespermanĝo). Tuta prezo sv. fr. 110.— aŭ 85.—.

D. Tendkampo.

Ĉe Bern troviĝas bela kaj bona tendkampo en Eichholz nur 2 km. de la Kongresejo. Por eksterlanduloj

Iu aŭ iuj ekzemple en Londono akceptu ĝis plue la gvidan taskon!

Estas tendenco inter teknikistoj aranĝi vortarojn laŭ faka ordo, t. e. ke oni dividas ilin en grupoj de parencaj terminoj. Laŭ pedagogia vidpunkto la sistemo estas bona ĉar oni vidas la parencecon de la vortoj, kaj precipe dum ellaborado de vortaroj la sistemo estas bona. Sed por ordinara uzo la alfabeto ordo estas pli praktika, se oni bezonas rapide konstati, ĉu vorto estas ĝusta aŭ kian tradukon ĝi havas en iu lingvo. Mia propono estas, ke ni kreu internaciajn vortarojn, kie la terminoj venas laŭ alfabeto ordo de la esperantovortoj kaj kun esperanta difino sed krome kun traduko en la ĉefaj lingvoj. Poste estas la tasko de esperantistoj en diversaj landoj krei naciajn eldonojn (nur terminoj, ne difinoj). Do: multlingvaj terminaroj kun esperanto kiel unua lingvo, dulingvaj terminaroj kun nacia lingvo kiel la unua!

Ĉu ni kiel unuan paŝon povas promesi preparon de naciaj tradukoj de la IEL-terminaroj? Mi povas menci ke la aeronautika terminaro kaj la radio-terminaro jam havas svedan tradukon manuskripte.

S a l e x.

ĝi estas tute senpaga. Eble troviĝos kelkaj tendoj por tiuj, kiuj ne povos kunporti tendon. Luprezo 1 sv. fr. po nokto.

La Loka Komitato skribas:

Ni devas atentigi, ke ne nur por la hoteloj, kaj la privataj ĉambroj, sed ankaŭ por la amas-restejo la baldaŭa mendo estas tre necesa kaj la samtempa pago de la tuta monsumo en svisaj frankoj al iu banko por la konto de la "32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Berno" per la Schweiz. Volksbank en Berno.

Ni povas garantii nur pri tiu restado dezirata de la kongresano, kiu sekvos niajn instrukciojn. Ni petas vin, kiel eble plej frutempe decidi vin pri la aliĝo, ĉar en multaj landoj troviĝas deviz-malfacilaĵoj kaj pro tio klopodu havigi al vi tuj la necesajn deviz-permesojn, se tio estas necesa en via lando.

DANKON AL SVEDAJ SAMIDEANOJ!

Pola samideanaro esprimas sian koregan dankon al Sveda Esperanto-Asocio kaj al svedaj samideanoj, kiuj rapidis kun helpo al polaj esperantistoj, suferintaj dum la germana okupado en Pollando, sendante vestaĵojn. Parton da ili disdonis varsovia Komitato, la reston, t. e. 234 pecoj, oni starigis al dispono de Asocio de Esperantistoj en Pollando kaj la Ĉefa Estraro disdonis ilin al 40 personoj en 11 urboj. La senditaj vestaĵoj ghojigis multajn el ni, ĉar ili kompletigis, kvankam per uzitaj, la eluzitan dum la milito garderobon.

Vivu sveda samideanaro!

Vivu Esperanto, la ligilo inter la tutmonda homaro!

Ĉefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando.

20:a SAT-KONGRESO

okazos la 2—7 aŭgusto 1947 en Aarhus, Danlando.

Aarhus, kiu estas tre bela urbo, havas kun la antaŭ-urboj 140,000 enloĝantojn kaj situas bele apud la maro Kattegat.

La kongresejo estos en la bela Popola Domo, kiu situas en la centro de la urbo nur kelkajn minutojn de la stacidomo kaj la haveno.

La kongresa kotizo estas por ne SAT-anoj 13 d. kr. antaŭ la 1:a de junio 1947 kaj post tiu dato ĝi estos 16 d. kr.

Aliĝon oni sendu al la prezidanto en la organiza kongresa komitato Magnus Jacobsen, Brendstrupvej 8, Aarhus, Danio.

SALUTON!

En Heroldo ni trovas artikolon kun la supra rubriko kaj tranĉas el ĝi kelkajn liniojn:

Ni ĉiuj sentas koran kunsenton, eĉ kun nekonata esperantisto, kaj estas pretaj konatiĝi kun li aŭ ŝi, pro la Esperantismo kiu ligas nin.

Kial do ni, esperantistoj, ne havas propran salutgeston, kiu identigos nin, kuintiros nin, kaj eble pro-pagandos por nia afero?

Mi proponas ke, tenante la kubuton ĉe la ripoj, oni levu nur la antaŭbrakon rekte antaŭen, kun la larĝe malfermita manplato montrata al la rigardo de la salutato, kaj la fingroj kiel eble plej larĝe disstarigitaj. La fingroj, tiel pozitaj, reprezentus la kvinpintan stelon. La malfermita manplato esprimus pretan fratemecon universalan.

La gesto estus simpla kaj nur momenta. Ĉar la fingroj ne leviĝus pli alte ol ĝis la ŝultra alto, ĝi ne estus "fanfarona", kaj eĉ la plej modesta, sinretenema povus kuraĝi uzi ĝin. Oni gestus per dekstra aŭ maldekstra brako, laŭ la cirkonstancoj. Oni povus gesti tiamaniere, eĉ se oni estus portanta sub la brako pakajon, bastonon aŭ ombrelon.

Mi sugestas ke vi mem faru la proponitan geston antaŭ spegulo, kaj poste esprimu opinion pri ĝi.

Robert Robertson, F.B.E.A.

Bonan hejon!

Red.

Du grupoj de leteroj.

Ni priparolis en la oktobra numero la du grupojn de leteroj, kiuj nuntempe estas la ĉefaj en nia poŝto. Ili ambaŭ pritraktas la suferon de la mondo. La unua grupo atentigas nin pri la timo antaŭ la vintro ĉe mezeŭropaj samideanoj. La dua grupo estas la cirkuleroj de la samideanoj, kiuj vokas nin al novkreitaj organizoj celantaj al unuigo de la popoloj por certigi la pacon.

El la dua grupo

ni elektis du cirkulerojn: de la "Pacifista movado de patrinoj" kaj de "Universala Ligo", UL, kaj donis en la menciita numero kelkajn sciigojn kaj adresojn.

Oni tamen atentigas nin ankaŭ pri aliaj alvokoj. Tial ni hodiaŭ sciigos pri ankoraŭ tri mond-skalaj organizoj: "La konferenco pri Mondregistaro ĉe la Kolegio Rollins", la "Amikoj de la Homaranismo" kaj la internacia asocio "Bellamy".

Pri "Amikoj de la Homaranismo" ni en la literatura kolono mencias la ekeldonon de ĝia gazeto "La Vivo".

"La Rollins-konferenco" salutas la Unuiĝintan Naciaron kiel "la plej gravan paŝon al mond-paco iam ajn faritan de la homaro", sed la konferenco proponas ke Ĝenerala Konferenco de la Unuiĝinta Naciaro estu kunvokata laŭ kondiĉoj en Paragrafo 109 de la Kontrakto, por projekti revizion tiel ke la Unuiĝinta Naciaro estu ŝanĝata de ligo de suverenaj ŝtatoj en registaron, kies precizaj povoj devenos de la popoloj de la mondo.

El la principoj de la deklaro de la konferenco ni ĉerpu:

La paco ne estas nur la foresto de milito, sed la ĉesto de justeco, de ordo — mallonge, de orda regado.

Mondpaco povas esti kreata kaj konservata sole sub mondleĝo, universala kaj sufiĉe forta por starigi justecon kaj eviti armilan konflikton inter nacioj.

La sola metodo per kiu iu popolo povas certigi sian vivon kaj konservi siajn liberecojn estas krei kun la aliaj popoloj mondregistaron — konstitucian, federacian registaron — al kiu estos delegitaj la povoj necesaj por konservi la ĝeneralan pacon de la mondo, starigitan sur leĝo kaj justeco.

Interesuloj povas skribi al "Conference on World Government", Rollins College, Winter Park, Florida, USA.

Internacia asocio "Bellamy" (Torenstraat 26, Beverwijk, Nederland) estas fondita por "la disvastigado kaj propagandado de la principoj de la ekonomia sistemo de Edward Bellamy, klare priskribitaj en ambaŭ liaj verkoj 'Looking Backward' (Rigardante Malantaŭen) kaj 'Equality' (Egaleco) fonditaj sur la fundamento de egala provizado, praktika kunlaborado, rajto, devo kaj respondeco".

La asocio korespondas esp-lingve.

Al la unua grupo

de leteroj ni respondas per ripeto de la du gravaj adresoj de la helpkomitato:

Por mono: SEF poŝtgiro 2012, Tegelbacken, Stockholm C. Skribu sur la kupono "Alamo" aŭ la nomon de la lando, je kies helpo vi precipe pensas.

Por varoj kaj vestoj: Sinjorino Karin Hägglund, Pontonjörgatan 35, Stockholm K.

Sommarkurs 1947. Det kan synas en smula tidigt att tala om nästa års sommarkurs, men en energisk intervjuare från Västgöta-korrespondenten lyckades förmå esperantisternas studieledare i Skövde S. A. Jacobson att berätta, att Svenska Esperanto Institutet gett Skövde-klubben att ordna en internationell sommarkurs på Studiegården. Vi få nog anledning återkomma. Av Skövde har man alltid mycket att vänta.

Universala Ligo.

Ett "Människornas Förbund"

Den 14 april 1942, på 25-årsdagen av doktor Ludvig Zamenhofs död, bildades i Haag ett förbund, Universala Ligo, vars mål i korthet är att för säkrande av världsfreden främja folkens förenande i en världsomfattande federation. Denna skall vara demokratiskt organiserad enligt principerna om personlig frihet, nationernas likställdhet, social rättvisa, allmän folkbildning, organiserad världsekonomi och solidariskt samarbete.

I några år har föreningen måst arbeta i det tysta, men nu framträder den med upprop till fredsälskande människor i alla länder om bildandet av ett förbund över nationsgränserna och med esperanto som mellanfolkligt språk.

Förbundet har på sista tiden utvecklats raskt och omfattar individuellt anslutna medlemmar, inte endast esperantister, utan även andra, som bekänner sig till broderskapets ideal.

Förbundet vill med alla medel främja internationellt umgänge, såsom genom resor, läger, kurser och korrespondens. Det kan redan lämna medlemmarna en del förmåner, t. ex. förbundets tidning, La Praktiko, som utkommer en gång i månaden.

Universala Ligo har grundat ett eget penningssystem, där myntenheten är 1 stelo, som delas i 100 pintoj. T. v. är myntenheten bunden vid den holländska valutatan, så att 1 stelo är = ¼ gulden (= 0,34 kronor). Alla avgifter, bokpriser m. m. räknas i den nya valutan.

Ordförande i Universala Ligo är professorn vid universitetet i Neuchatel, Schweiz, Edmond Privat, och sekreterare är pastor Andreo Cseh, grundaren av den kända språkundervisningsmetod som bär hans namn.

Svensk representant för UL är Tiberiu Morariu, adress Tegelbackshuset, 3 tr., Stockholm C.

DANLANDO.

La dua dan-sveda tago okazis la 8-an de sept en Lyngby apud Kopenhago en internacia atmosfero. Ĉestis ja gesamideanoj el diversaj nacioj.

La komitato dana, s-roj Kühlmann, Møller kaj Vasiljef bone organizis. Ili tute ne povis helpi, ke la speciala kongreso de UNO, kiu samtempe okazis en Kopenhago, deziris ĉiujn aŭtobusojn por diversaj celoj.



En la sunbrilo antaŭ la urbodomo (maldekstre) en Lyngby.

La vizito en la pompa kaj luksa urbodomo de Lyngby estis vere interesa, kaj la solenaĵo en la granda salono en la plej supra etaĝo altiris grandan atenton. Ni speciale memoras la simpatian urbestron de la urbo. Li faris bonegan paroladon, kaj ni ne povis ne rimarkilian respekton por la lingvo esperanto.

La humoro estis bonega, kaj la posta marveturado altiris grandan atenton flanke de la marborda publiko, kiam la marveturantoj takte kriis "Vivu Esperanto! Vivu Esperanto!"

LERNEJKAMARADOJ.

(El la sveda tradukis Ture Wedensjö)

— Ĉu vi ne mem komprenas ke vi ne povas daŭrigi tiamaniere. Direktoro Ernst Dahl batis malpacience sur la dokumentoj, kiuj kuŝis antaŭ li, kaj li rigardis kolerhumore sian kompanion Oscar Wern. Tiu ankoraŭfoje prenis la dokumentojn kaj trarigardis ilin. Liaj manoj skuetis iomete. La granda larĝoŝuldra tondranta Dahl ĉiam nervozigas lin. Li mem estis malgrandkreska, maldika kaj cedema. Neniam li povis protesti kontraŭ Dahl, kvankam ili estis lernejkamaradoj kaj konis unu la alian de la infanaĝo.

— Ne sidu kaj rigardaĉi tiel malsaĝe en la kontrakton, daŭrigis Dahl per malafabla voĉo. Ke la negocoj malgrandiĝas estas evidenta kaj klara afero. Mi kredis ke ili pliboniĝus dum mia forestado, sed mi konstatas la malon.

— Nu, vi ne estu maljusta, diris Wern kviete. Vi ja estas forveturinta preskaŭ dum duonjaro kaj mi sola disponis la monon. Kaj kiel vi scias, la tempoj estis malfavoraj, preskaŭ por ĉiuj komercistoj. La rimarkigo estis tute ĝusta. Kiel ĉio, kion Wern diris. Sed li aldonis ion, per kio li ne flatgajnis Dahl:

— Via vojaĝo ankaŭ ne estis malmultekosta.

— Kion vi diras, kriis Dahl kaj frapis la tablon per la pugno. Ĉu estas necese ke mi prezentu la kalkulraporton al vi? Ĉu vi eble malgajnis vian monon? Ĉu ne plaĉas al vi, ke mi avancigis vin kiel mian kompanion? Se mi tion ne estus farinta vi hodiaŭ estus simpla kontoristo. Se vi ne konsentas... jes, tiam ni povos disiĝi. Estas eble la plej saĝa, kion ni povas fari.

Dahl eliris el la ĉambro kaj fermis la pordon klake malantaŭ si.

Wern levis siajn mallarĝajn ŝultrojn. Tiuokaze li ne plu estus kompaniano...?? Kaj el la grandegaj afiŝoj de la firmao Dahl & Co. malaperus por ĉiam tiu "Co" — vorteto, kiu lin reprezentis. Kaj oni ĉiam minacos lin ke oni eljetos lin sur la straton. Li estas tamen dankema al Dahl, ĉar li ne spekulis post sia hejmenveno de eksterlando. Tiuokaze ja Wern estus responde, kaj la respondeco certe kondukus lin al konflikto kun la justeco.

Dahl heredis la firmon de sia patro kaj fariĝis laboronanto al maljuna lernejkamarado, donante al li okupon kiel ĉefkontisto. Wern komprenis tre bone, ke okazis tiel, ĉar Dahl bezonis honestan kontraŭpezon. Li mem neniam estis sufiĉe lerta en komercaj aferoj. Tial Wern estis okupita ĉe la firmao dekojn la jaroj. Dahl implikis sin en komercoj, kiuj kaŭzis, ke Wern fariĝis singarda, sed tiam Dahl tuj avancigis lin je kompaniano; ekz. li ricevis nur 10 procentojn de la neto. Sed Wern estis kontenta. Li ricevis sufiĉe da mono por aĉeti malgrandan domon kun ĝardeno, kie li kaj lia edzino povis vivi kaj laborumi dum la libertempo. Kelkfoje li tamen enviis sian kompanion Dahl, kiu posedis belegan domon preskaŭ palacon, plue du aŭtojn kun ŝoforoj.

Sed tiufoje estis Wern ekscitigita. "Li estus arestita jam kelkfoje, se mi ne ekzistus", li murmuris.

Li nerveze ĉirkaŭrigardis. Ĉu iu ne aŭdis lin? ... Iu frapis sur la pordo, kaj la oficisto transdonis al li vizitkarton.

"Civilinĝeniero Georg Bent", Wern gaje ridis. "Bent, maljuna Bent ankoraŭ vivas." La lernejkamarado kiu ĉiam estis tiel afabla al li kaj defendis lin kontraŭ la aroganteco de la pli grandaj kamaradoj.

Bent estis " eminentulo " de la klaso. Bedaŭrinde Wern ne renkontis lin post la studenta ekzameno. Li certe faris grandan karieron! Eĉ ĉiuj instruistoj antaŭdiris al li bonegan estontecon.

— Lasu inĝenieron Bent tuj enveni! Alta malgrasa viro envenis. Wern ridante iris al li, sed la rideto rapide malaperis. Ĉu ĉi tiu homo vere estas Georg Bent? Liaj vestoj estis eluzitaj kaj lia vizaĝo estis sulka. Ne restis multe de la belega, gaja Georg Bent el la lerneja tempo.

Wern tute embarasiĝis, sed Bent ŝajnis esti tute netuŝita. Li kore prenis la manon de Wern kaj nepetate

sidigis en la apogseĝo ĉe la flanko de la skribotablo.

— Ĉu vi vere iĝis kompaniano de Dahl? li komencis kaj eliris faskon da dokumentoj el eluzita aktaĵo.

— Jes, antaŭ kvin jaroj.

— Kaj ĉu vi estas kontenta pri via vivo?

— Mi ne plendas. Kaj vi mem?

Bent ridetis iomete.

— Dankon, tion mi nun diros. Ĉu vi havas aŭton?

— Ne, mi ne havas. La respondo de Wern estis iomete mallonga kaj ekscitita. Li vidis, ke la konduto de Bent vere estas iomete stranga.

— Hm. Do vi ja ne komprenas motorojn kaj simile? Ne, tion vi ne povas kompreni. Sed rigardu ĉi tien!

Bent elprenis kvanton da desegnaĵoj kaj metis ilin sur la skribotablon de Wern, kaj li forpuŝis la fatalan kontrakton kaj multe da aliaj dokumentoj. Wern rapide kunkolektis la paperojn kaj metis ilin sub marmoran leterpremilon.

— Kio estas ĉio? li iomete malpacience demandis.

— Estas desegnaĵoj por nova aermaŝin-motora, kiu estiĝos mondartiklo. Ĝi signifas revolucion en la tuta aermaŝina tekniko.

— Kaj... kaj kiu eltrovis ĝin?

— Estas mi kiu konstruis ĝin. La rigardoj de ambaŭ viroj renkontiĝis. Wern esplore rigardis kun senkulmeta rideto la vizaĝon de la lernejkamarado, sed Bent estis serioza.

— Ne estu stulta! diris Bent kun riproĉa rigardeto. Mi venas kun la granda ŝanco de nia vivo.

Wern ruĝiĝis — same kiel li kutimis fari dum la lerneja tempo. Estis ĉagrene ke li ĉiam sentas sin tiel malsupera.

— Kion vi volas diri? li demandis.

— Sidigu, kaj mi klarigos al vi.

Wern sidigis obeeme.

— Ĉi tiu motora estas la rezulto de multjara laboro. Vi certe komprenas laŭ mia aspekto, ke mi ne fartis tre bone dum la pasintaj jaroj. Mi oferis ĉiun mian havaĵon por ĉi tiu motora. Sed nun ĝi estas pretita. Mi faris mian laboron. Nu, la kapitalistoj faru la sian!

— Vi... vi ne rajtas nomi min kapitalisto, Georg!

— Mi bezonas por la afero 10.000 kronojn. Rekompenco mi proponas al vi dividi la gajnon egale. Jes, ne estas necese aspekti tiel enpensiginta! Mi diras al vi mian deziron. Mi ne povas ĉiuokaze riski, ke mi fariĝu milionulo. Kion vi diras? Ĉu vi havas la 10.000 kronojn?

Wern havis ilin. Li havis pli ol 10.000 kronojn, ĉar li vivis ŝpareme. La spekulacioj de Dahl havigis ilin al li. Okaze ke venus krizo li havis ion por povi komenci denove. Sed tiun monon li tamen preferus ŝpari. Li ankaŭ devis pensi al Eva, sia edzino... Sed kiamaniere li esprimu al sia malnova kamarado, ke li ne konsentas?

— Kara Georg, li komencis.

— Dankon! eldiris Bent kaj ekstaris. Kiam oni komencas diri "Kara Georg" aŭ "mia kara Bent", tiam mi jam scias la daŭron. Pardonu, ke mi ĝenis vin.

(Daŭrigo.)

Radio

Polio.

La varsovia radiostacio Warszawa III (mallonga ondo 49,06) sendas esperante ĉiulunde je h. 22,10 (21,10 laŭ tempo de Greenwich). Aŭskultu kaj afable skribu al la direkto: Warszawa, Koszykowa 8.

VERDA STACIO DENOVE!

Granda evento en la mondo esperantista estas la reapero de la Verda Stacio. Tiun ĉi nomon portas nun PRAHA I (470 m), kiu dimanĉe la 27-an de Oktobro je 23.00—23.30 elsendis vere ĝuidan programon kun bela muziko kaj same belaj kantoj prezentataj de fama ĉeĥa operokantistino. — Membroj de la Nacia Teatro kaj la Urba Teatro de Praha recitis poemojn kaj prozaĵojn de ĉsl:aj aŭtoroj, kaj tion ili faris kun tia viva sento, ke la tuta prezentado fariĝis forta rebato al tiuj, kiuj opinias Esp-on malviva kaj senbeleca komprenigilo de poŝtmark-kolektantoj! Jes, vere ĉarma kaj aplaŭdinda programo!

I. S.

Bernhard Lavén



Örebro Esperanto-Societo havas funebbron. Dimanĉe la 13-an de okt. mortis en sia hejmo en Örebro la remburisto Anders Bernhard Lavén, membro kaj honora prezidanto de la esperanto-societo.

Li povis travivi sian lastan someron kun ĝia mirinda beleco en feliĉa sencio pri la speco de la malsano. Sed kiam la somera verdiĝo malaperis, kiam la floroj velkiĝis kaj la folioj de la arboj falis flavaj al la tero, tiam ankaŭ li estis rikoltata de la Morto-Falĉisto.

Per Lavén, neordinare bona homo, estas for. Li kvazaŭ brilis de harmonio kaj amikeco, kaj lia malsevera kaj afabla persono, karakterizata de ideala vivkoncepto kune kun firma kredo ke la bono venku, kreis atmosferon de komuneco, sekureco kaj optimismo ĉie, kie li estis. Li havis noblan karakteron, kiu bone harmoniis kun lia teozofia vivkoncepto, al kiu li konfesis sin antaŭ multaj jaroj.

Lavén 64-jara komencis studi esperanton kaj aliĝis al la esperanto-movado, kio estas bona pruvo je lia juna temperamento kaj kredo pri bela estonto. Ĝis la fino li estis unu el la plej aktivaj membroj interne de la esperanto-societo, kaj li interesiĝis por la movado kun vera pasio. Iam li ankaŭ estis prezidanto kaj en la esperanto societo kaj en la Örebroa distrikto.

Lavén naskiĝis en Halland 31/12 1865 kaj do li baldaŭ atingus 81 jarojn. En Halland li lernis sian profesion, kaj poste li venis al Göteborg kaj al Hudiksvall, kaj en 1896 li venis al Örebro por tie resti. Kiel ĉeflaboristo li havis oficon ĉe la firmao Lövgrens Möbelfärd kaj la saman okupon ĉe la Firmao Eriksson & Jonsson. En Hagaby apud Örebro, li aĉetis al si domon, kaj tie en la ĝardeno la esperantistoj ofte kolektiĝis por kunveni dum la belaj somervesperoj. En marto 1945 lia fidela edzino iris trans la limon de la granda nekonata mondo. La gemaljunuloj tiam estis unuigitaj en 55-jara edzeco.

Lavén mem baldaŭ sekvis sian edzinon. Post longa kaj riĉa vivo kiel servanto de la bono li foriris silente kaj kviete. Lia bela kaj hela memoro longe vivu kaj li ripozu pace!

La mortinton funebras kvar filoj kaj unu filino, kiulasta ame flegis siajn gepatrojn dum multaj jaroj.

R. L.

GUSTAV LIDBJER, 50-jara.

La 11-an de nov. s:ro G. Lidbjer, Lund, solenas sian 50-jaran naskiĝtagon. En la jaro 1935 li komencis lerni Esperanton, kaj la saman jaron li aliĝis al la Esp. klubo de Lund. Li trapasis elementan kaj superan ekzamenojn, kaj en la jaro 1939 li vizitis Nederlando. En la klubo li funkciis kiel kasisto, kaj nuntempe li estas v. prez. Krom tio li estas reprezentanto de Eldona Societo Esperanto. Per sia helpemo kaj gaja kaj bona humoro li ricevis multajn amikojn, kiuj volas alporti al li la plej korajn salutojn okaze de la festotago.

La red. kore gratulas!

Edvard Björkstrand

50-jara.



La 10-an de decembro la telegrafa komisario de Arvika, Edvard Björkstrand, fariĝos 50-jara.

Edvard Björkstrand naskiĝis en Östersund, faris la abituriantan ekzamenon en Sundsvall kaj fariĝis telegraf-asistanto. De 1944 li sidas kiel estro de la telegrafejo en Arvika.

Edvard Björkstrand estas unu el la sep esperantistoj, kiuj en 1927 fondis la klubon Amika Rondo en Sundsvall. Dum multaj jaroj li estis kluba estrarano kaj ankaŭ prezidanto kaj klubgazeta redaktoro.

Multjara amika kunlaboro kun Edvard Björkstrand dum miaj Sundsvallaj jaroj konvinkis min pri tio, ke li apartenas al la elito de niaj svedaj esperantistoj. Lia gramatika sento estas akra. Li povas analizi kaj enpenetri en la plej komplikitajn lingvajn problemojn.

Kvankam li nuntempe estas malpli aktiva esperantisto ol antaŭe, li restas fidela al sia malnova idealo, ĉiam preta defendi nian lingvon en diskutaj atakoj, kiam ajn li havas okazon, ĉar li unufoje por ĉiam konvinkiĝis pri tio, ke esperanto ne estas utopio sed la vera solvo de la mondlingva problemo.

Honoron al Edvard Björkstrand, ĉar honoron li meritas.

Algot Hellbom.

Vitek en Svedujo.

Nia ŝatata prelegisto Josef Vitek en la septembra numero de "Esperantista" finskribis sian rakonton "Gajaj rememoroj el Svedujo". Li finas sian rakonton per tiuj vortoj:

Kvar monatoj, kvar plej belaj monatoj de mia ĝisnuna vivo, estas for kaj restas nur rememoroj... Vi, karaj svedaj gesamideanoj, multon faris por mi, sed, kaj unuarange, vi multe faris por mia renaskiĝinta ŝtato. Ĉiam mi estos fiera, ke mi povis al vi ĉiuj rakonti pri tiu malgranda mezeŭropa ŝtato nomata Ĉeĥoslovakio, kiun mi tiom amas kaj kiu por sia evoluo en la estonteco volas nur tion, kion vi ĉiuj: eternan pacon kaj amikan kunvivon de ĉiuj popoloj! Tack för eder hjälp och på återseende en gång till!

Josef Vitek.

ERIK OLSSON 50-JARA.

La prezidanto de Skånes Blindförening Erik Olsson i Arlöv povis festi sian 50-jartagon la 7-an de nov. Li apartenas al La Klubo Esperantista de Malmö de antaŭ 29 jaroj kaj estas tie tre ŝatata debatanto, kiam liaj blindul-organizaj laboroj donas al li eblecon dediĉi sin al esperanto.

NASKIĜO.

Ges-roj Signe kaj Erik Lindberg (Borås) sciigas siajn amikojn pri naskiĝo de fileto. La redaktejo gratulas kore.

Brunnsvik. Enligt ett meddelande, som i pressläggningen når redaktionen, kommer att vid LO:s skola i Brunnsvik esperantoundervisning ordnas fr. o. m. vårterminen 1947.

LINGVA KOLONO.

Pri apostrofo.

En ĉi tiu gazeto — mi ne scias ĉu ankaŭ aliloke — elkreskis tendenco, forviŝi la apostrofojn ĉe elizioj en versoj.

Kion do diras Zamenhof pri la elizio? La 16-a regulo tekstas jene laŭ Fundamenta Krestomatio kaj Oficiala Klasika Libro: "La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo". Pli severaj estas la formuloj en la angla kaj germana partoj de la Fundamento, kiuj emfazas, ke la vokaloj devas esti anstataŭigataj per apostrofo. La forigo de la apostrofo sekve estas rekte kontraŭa al la Fundamento.

La apostrofo havas duoblan funkcion. Unuavice ĝi indikas ke la a de l' artikolo respektive la o de l' substantivo estas forlasitaj, sed ĉe la substantivoj krom tio ĝi ankaŭ montras la akcenton. Ekz. ĉiel (radika vorto) havas la akcenton sur i, dum ĉiel' (elizio de ĉielo) havas la akcenton sur e. Tio estas grava.

Mi bone konas la argumentojn por la forigo de la apostrofoj. Oni diras ke ili malbeligas, dissplitas la verson. Tio estas vera, la apostrofado — t. e. la troa apostrofado — estas malbelaĵo, ĝeno al la estetikeco. Ĉi tiun malbelaĵon oni devas kiel eble plej forigi, sed ne tiamaniere ke oni simple forviŝas la apostrofojn, oni devas eviti la apostrofadon, la elizion mem. Kiel agrable estas legi poemon sen elizioj! Kaj fakte estas eble fari poeziaĵon sen elizioj, sed oni devas adapti la versaĵojn al la spirito kaj karaktero de Esperanto, elekti konvenajn ritmon kaj strukturon de l' verso. En unu speciala kazo tio ne estas efektivebla, nome ĉe versoj kiuj estas intencitaj por kantado kaj adaptitaj al muziko. Tie oni nepre devas konservi la originalajn nombrojn kaj strukturon de la verspiedoj. Sed ankaŭ tie lerta tradukanto povas redukti la apostrofadon. Bona ekzemplo pri tio estas la traduko de "La Feliĉo" fare de Salex en la oktobra numero. Kvankam mi vidis tiun tradukon antaŭe, nur nun mi ekrimarkis ke escepte de la artikolo en tiuj tri 12-versaj strofoj troviĝas nur du elizioj, odor kaj kor, kaj ili — en la versfino — tute ne ĝenas (ankaŭ la apostrofoj ne ĝenus!).

Generala rimarkigo:

Kiam ni studas aŭ uzas alian fremdan lingvon, la anglan, la rusan, la francan k. t. p., ni akceptas ĝin, kia ĝi estas, ni observas kaj obeas la regulojn kaj kutimojn de la respektivaj lingvoj, ni ne ŝanĝas idiomajn pro tio ke ĝi ne estas tute logika, nek proponas ke oni forigu tiun aŭ alian sonon el la lingvo ĉar estas malfacile al ni prononci ĝin. Sed kiam temas pri Esperanto, ŝajne ĉiu arogas al si fari ŝanĝojn kaj "plibonigojn" aŭ almenaŭ proponojn pri tiaj. Esperanto estas ĉies (kaj nenies) propraĵo. Tio ne signifas ke mi rajtas trakti kaj formi ĝin tute laŭ mia bontrovo, ĝi apartenas ja ankaŭ al ĉiuj aliaj, kaj ties propraĵon mi ne rajtas tuŝi aŭ reformi. Zamenhof lasis al ni tiel grandan liberecon rilate la lingvouzon, ke ni preskaŭ povas nin kiel ajn esprimi en la lingvo. Li ĉiam evitis doni rigoraĵojn regulojn. Do, kiam ni havas tiun liberecon, ĉu ni ne povus montri respekton al tiuj malmultaj reguloj kaj gvidaj principoj, kiuj estas donitaj en la fundamentaj oficialaj dokumentoj de Esperanto, la Fundamento, Lingvaj Respondoj, Oficiala Klasika Libro, k. a.?

Bigo.

La skribanto de la sekvantaj linioj tute samopinias pri tio, kion Bigo diras sub la rubriko "Generala rimarkigo". Sed de tio al aprobo de lia defendo por apostrofoj en esperanto-poezio la paŝo estas longa.

Bigo citas doktoron Zamenhof ĝuste, sed li legas lin malĝuste. Zamenhof ja ne estis poeto, sed li skribis bonan versaĵon, kaj li sciis la valoron por la versformado de multaj, almenaŭ duoblaj, esprimoj por iu ideo.

Li ankaŭ atentigas nin pri tio ke al esperanto estas donata tiu favoro, ĉar ĉiu vortradiko ankaŭ estas vorto. Se ne estus tiel, la esperanto-poezio ja ne havus pli da viraj rimoj ol la malmultajn, kiuj estas formeblaj de la 83 unusilabaj vortoj en nia lingvo.

La substantiva finaĵo -o do povas je bezono senĝene forigi kaj povas anstataŭi ĝin apostrofo. Kompren-eble, kiam estas postulata. Tiel ja la regulo de Zamenhof estu legata, se oni prudente juĝas pri ĝi!

La regulo ne konsiderus la esencon, se oni interpretus ĝin kiel Bigo faras. Poezio estas bela arto. Pro tio oni postulas, ke ĝi estu prezentata en tre zorgita, prefere belega vesto. Ke oni permesas al la ekscitigaj langoj de la apostrofoj flugilbati en la versoj, estas ne nur abomene, tio estas krimo kontraŭ io multe pli alta ol la gramatiko — kontraŭ la poezio.

La diro ke la apostrofojn oni bezonas por povi legi poemon ne havas ion komunan kun la arto de recitado. Mi denove diras, ke poezio estas bela arto: tiu kiu kredas ke li povas reciti poezion je la unua vido, li ne scias kio estas poezio aŭ li estas genio. Sed se li estas tia, li tuj kaptas la versmezuron. Ni aliaj ankaŭ ne bezonas la apostrofojn por ĝuste legi versaĵon, ĉar la mallongaj vortoj — observu, ne la mallongigitaj, kiajn ja esperanto ne konas — neniam estas pli multaj ol ke ili lasas sin kapti de la mezuro, kaj do ne povas delogi al malĝusta legaĵo. Kaj se tiel okazus, ja Zamenhof donis al ni la regulon pri la apostrofoj ĝuste por tiaj maloftaj kazoj.

Teodor Julin

Läroböcker för Kurser och självstudier

Dahl:

LÄROBOK I ESPERANTO FÖR SKOLAN 2: 50
(för skolkurser endast 1: 25)

Szilágyi:

KURS I ESPERANTO (illustr.) 2:—

Jansson:

PRAKTISK LÄROBOK 2:—

Skrivövningar till dito 1:—

Massiak:

LÄROBOK I ESPERANTO FÖR ABF ... 2:—

Seppik-Malmgren:

SYSTEMATISK KURS 1:—

Lindén:

KURS I ESPERANTO 0: 90

O R D B Ö C K E R

SVENSK-ESPERANTISK ORDBOK inb. 7: 50
hft. 6:—

ESPERANTO-SVENSK ORDBOK ... inb. 5:—
hft. 3: 75

DUBBEL FICKORDBOK inb. 2: 50
hft. 1: 50

NYCKEL TILL ESPERANTO, miniatyr-
lärobok med esperanto-svensk ordbok .. 0: 10
(+ 15 % för oms och porto)

Allt ifråga om esperanto-litteratur, studiematerial och tidskrifter från

FÖRLAGSFÖRENINGEN E S P E R A N T O
Box 19071 Stockholm 19 Postgiro 578

S I E I F Kolono

Esperanto i folkskolan.

I Uddevalla folkskolor har det bedrivits frivillig undervisning i esperanto i anslutning till det ordinarie schemat sedan 1942. Även innevarande läsår har en kurs startats av folkskollärare Einar Dahl. Det är 15 elever i femte klass, som studerar en timme i veckan efter den lärobok i esperanto för skolan, som nu finns till förfogande.

Det dröjer ju ett tag, innan eleverna själva per korrespondens kan komma i förbindelse med barn från andra nationer, men det hindrar inte, att man har livlig kontakt med andra länder. Esperanto är f. n. aktuellt läroämne vid skolor av skilda slag ute i världen, och det finns många klasser, som vill korrespondera, byta frimärken, teckningar, vykort m. m. kollektivt under lärares ledning. Det har visat sig vara till nytta och sporrar intresset hos eleverna, varför jag på det bästa vill rekommendera denna form av korrespondens till de lärare i vårt land, som nu arbetar med kurser för barn.

V a l o.

Rapportera omgående.

Det är av största intresse och värde, att man kan få en överblick över, i vilken utsträckning undervisning i esperanto bedrivs vid skolor i Sverige. Fördenskull be vi alla lärare, som undervisar, att omgående sända ett meddelande i saken till folkskollärare Einar Dahl, Kristinebergsvägen 16, Uddevalla. De förhandsmeddelanden, som inkommit, tyder på, att vi under detta läsår ska kunna räkna med en framryckning på skolans område, vilket är glädjande. Få vi bara in fasta informationer, så ska vi senare meddela tidningens läsare, hur landet ligger.

A g u.

RENKONTIGO EN JÖNKÖPING.

La 13-an de oktobro kolektiĝis esperantistoj en Jönköping, kie s-ano Knut Jensie aranĝis kunvenon kun enhavoriĉa programo. La kunveno okazis en La Kelo de Majstro Gudmund kaj komenciĝis je la 11-a horo pere de salutparolado de s-ro Jensie. Ĉeestis ĉ. 60 personoj el 15 lokoj. Nia estona samideano ingeniero Rein. Kapper parolis pri Estonujo dum la okupado kaj la gimnazia adjunkto, s-ano Stenström, Ulricehamn, prelegis pri lingvaj aferoj. Samideano Lennart Åberg, Skövde, parolis pri la propagando por esperanto. Krom tio nia blinda samideano aŭstria, s-ro Kriger, ludis klasikan muzikon kaj komercisto Allan Karlsson kantis konatajn kanzonojn.

Entute oni povas diri, ke la programo estis tre interesa kaj ke la ĉeestantoj estis kontentaj. Nur esperanto estis uzata dum la tuta kunveno. Tutcerte multaj el la ĉeestantoj estis vekitaj, kaj tio signifas novan energion kaj novan streĉon por esperanto en la distrikto.

P a r t o p r e n i n t o.

ESPERANTISTA KUNLABORO.

Gesamideanoj de Dalarnes Esperanto-distrikt kaj de vestmanlandaj esp-kluboj en Fagersta kaj Västerås kunvenis la 29-an de sept. en "Konsumrestaurangen" en Västanfors por interkonsili pri la eblecoj al kunlaboro por Esperanto en la regionoj. Unue diversaj reprezentantoj raportis pri la laboro de la hejmlokaj kluboj kaj pri la ĝenerala situacio rilate Esperanton en tiuj lokoj. Post kiam pluraj reprezentantoj parolis por proksimigo inter la esp-kluboj en suda Dalekarlio kaj norda Vestmanlando, oni laŭ proponoj de Karl Bengtsson kaj "Salex" interkonsentis pri fondado de Esperanta kunlabora komitato, kiu aranĝu kunlaboron kaj kunvoku al komunaj kunvenoj de la nomitaj kluboj (Krylbo, Avesta, Fagersta, Ludvika, Smedjebacken k. a.). Kiel ĉefreprezentantojn por la nova komitato oni elektis Birger Eklund, Fagersta, kaj Karl Bengtsson, Krylbo.

La junularkolono TJO

Internacia kontakto.

Unu el la plej gravaj kondiĉoj por sukceso de enlanda junularorganizo ja estas intima internacia kontakto; sen tia ĝi ne povas "vivi".

Feliĉe la junaj svedoj havas tian kontakton kiel membroj en Tutmonda Junular-Organizo. Ĝi estas la sola internacia junular-organizo kaj mirinda estas la laboro, kiun faris la nederlandaj geamikoj, estraranoj, rekonstruinte la organizon post la teruraj militaj jaroj. La malfacilaĵoj estis grandegaj, sed juna entuziasmo por la afero kaj vera laboremo venkis ilin, kaj nun TJO estas preskaŭ same forta kiel antaŭ la milito.

Mirindan laboron dum la milito faris nia amiko S:ro Holland en Anglio. Dank al li la angla sekcio ekhavis proks. 1000 membrojn. Ĉiu TJO-ano ŝuldas sian dankon al li pro oferema laboro.

Bonega laboro ankaŭ faris la belga peranto, la juna instruisto S:ro Carlos Braet en Bruĝo, Belgio. Kiel vizitanto ĉe la unua postmilita kunveno internacia, mi fakte miras pro lia brila talento rilate al organiza laboro; tio precipe rilatas la lerte organizitan kunvenon. Mi scias, ke en Belgio ekfloras la juna movado kaj certe havos brilan estonton.

En Francio laboras la instruistino S:ino Turi kaj laŭ raportoj ricevitaj, ŝi brave laboras kiel ĉefperantino kaj estrino de la sekcio, kiu en Francio same kiel ĉi tie estas en la kadro de la enlanda organizo.

En Hispanio laboras entuziasma junulo, Octavio de Diego la Rosa kaj malgraŭ la resisto, kiun montras la registaro rilate Esperanton, li sukcesis varbi gejunulojn por Esperanto.

La junularlaboron en Skotlando gvidas S:ro A. Gordon kaj inter alie la skotoj kaj la nederlandanoj venontsomere aranĝos junularinterŝanĝojn, kiuj agoj komencas esti pli kaj pli popularaj.

Menciinde ankaŭ estas la aktiveco en Svisio, Italio, Finnlando, Portugalio, k. t. p., sed mi prokrastas tion al venonta okazo.

Mallonge dirite, ekde la unua internacia junular-kongreso en 1937 la juna movado montris al la esperantistaro, ke ĝustaj estas la labormetodoj, kaj unu de la celoj ja estas eduki amasojn da junaj entuziasmoj je avantaĝo ankaŭ por la plenkreskulaj movadoj.

Do, ni svedoj devas ekagi por la estonto de la afero. Neniu rajtas esti indiferenta.

K. E. K.

TJO aliĝos al IEL?

Oni aranĝos referendumon inter la membroj kaŭze de la belga kaj sveda sekcioj rilate al aliĝo de TJO al IEL.

Varbu viajn amikojn por la junularsekcio!

La adreso estas: Svenska Esperanto-Förbundets Ungdoms-sektion, Tegelbacken, Stockholm C.

Artikolojn por la kolono vi sendu al la redakcio!

Skövde. Snabbkurs (20 tim.) för lärare och studenter, torsdagar. Ledare: L. Åberg. Nybörjarkurs måndagar. Ledare: F. A. Peters. D:o för ungdom 12—16 år onsdagar och fredagar. Ledare: L. Åberg.

Stockholm. La 7-an de oktobro s-ro T. Morariu prelegis en "Södermalms Arbetar-Institut" pri "En lösning av världsspråksfrågan" kaj faris provlecionen en Esperanto.

EL FINNLANDO.

Esperanto en lernejo.

Eble unuan fojon en la historio de finna lernejo okazis, ke la lerneja administrantaro proponis Esperanton kiel devigan fakon en sia lernejo. Tion faris ĉi-aŭtune la administrantaro de la geknaba liceo en Somero. La liceo estas 8-klasa kaj ĝi preparas siajn lernantojn ĝis altlernejaj studoj. Ĉiujare en la lernejo estas 246 lernantoj. Unuanime la administrantaro proponis, ke Esperanto estu instruata devige 2 lecionojn posemajne ĉe la unua klaso (do por 10—12 jaruloj).

La administracio de la publika instruado tamen "ne povis akcepti lecionplanon, kie Esperanto estas deviga fako". Tial Esperanto estis akceptata nur kiel libervola fako.

En la libervolaj Esperantolecionoj partoprenas el 41 lernantoj de la unua klaso 35 geknaboj, kiuj almenaŭ ĝis nun ŝajnas tre interesitaj. Oni menciis, ke samtempe ili komencis lernadon de sveda lingvo, kiu en niaj lernejoj estas unua fremda lingvo. Kiel instruisto de Esperanto funkcias la rektoro de la liceo, s-ro Joel Vilkki.

Se en Svedujo aŭ aliaj landoj ekzistas samnivelaj Esperantoklasoj, mi proponas, ke ili komencu korespondadon kun tiu en Somero (Adr.: La unua klaso, Yhteiskoulu, Somero, Finnuno). Komence la korespondado povus esti kolektiva, sed pli poste individua. Ni do atendas multajn salutojn kaj korespondproponojn.

Samtempe okazas en la sama lernejo du kursoj en Esperanto. Unu por komencantoj de pli superaj klasoj: 25 partoprenantoj. Alia daŭriga kurso kun 15 partoprenantoj, inter ili 4 instruistoj de la lernejo. Ankaŭ ĉi tiuj kursoj bezonas korespondantojn.

Joel Vilkki.

25-jara jubilea festo de Laborista Esperantista societo Antaŭen en Tampere okazis la 12-an de oktobro. Honora membro instruisto Antti Rasku faris salutparolon, magistro Vilho Setälä deklamis belajn poemojn kaj faris prelegon. F:ino Mömmö kantis, kaj instruisto H. Noponen prezentis tre interesan tabloon. Preskaŭ ĉiuj agemaj Esp-societoj en Finnlando sendis sian reprezentanton aŭ telegraman saluton. Miksa koruso de kareloj kantis dufoje. Fine estis manĝata komuna, bongusta tagmanĝo kun kafo. Pli ol 70 personoj ĉeestis.

UNGERSK RAPPORT.

Ungerns esperantorörelse tog ett stort steg framåt genom att vid gemensam kongress med olika förbund besluta en enhetsorganisation för hela landet.

Första resultat av sammanslagningen är den nya tidningen Hungara Esperantisto, vilken nu nått hit med sitt oktobernummer.

Det visar sig, att man vid sidan av kursverksamhet, som i Ungern — liksom överallt — måste bli organisationernas arbete nr 1, lägger an på att värva anhängare i riksdagskretsar. Man noterar att av de 80 tjänstemännen i ungerska parlamentet en kärna av 9 man äro goda esperantister, och att bland riksdagsmännen man har särdeles energiska förespråkare. Den 28 augusti medgav parlamentet en interpellation till ecklesiastikministern av Stefano Csurgai, som i inte mindre än åtta frågor sporde ministern om hans ställning till esperanto och hans möjligheter och villighet att införa språket i skolväsendet. Vi få hoppas på ett utförligt svar.

Dagens esperanto-arbete i parlamentskretsar går ut på att förbereda en interparlamentarisk sammankomst i Bern 1947 med esperantotalande riksdagsmän från olika länder.

Turismo hungara. Fremdultrafika Oficejo de Budapest eldonas esperantlingvaj broŝurojn pri Budapest. Petu ekzemplerojn de la oficejo rekte, adreso: Deak Ferencstr. 2, Budapest V.

EL RUMANIO.

A r a d. — Esp. kursoj en Komerca Ĉambro, Industria Liceo, Sindikato de Privataj Oficistoj, Soc.-Dem. Partio. Kursgvindanto: Edmund Vincze.

B r a s o v. — Kolonelo D-ro F. Iosif, malnova esp., faris propaganda paroladon pri Esp. S-o Emil Bucur gvidas kursojn.

B r a i l a. — En ĉi Danuba havenurbo M. Dragomir fondis esp. klubon.

O r a d e a M a r e. — Du stratoj de la urbo estis oficiale nomitaj: "Strato de L. L. Zamenhof" kaj "Strato de Esperanto".

Vicurbestro Dumitru Vanea gvidas esp. kurson.

Balkanesperantister. Den 26 augusti hölls i Assenovgrad i Bulgarien den första balkan-esperanto-kongressen. Den nya tidningen RES, som är "informabulteno" för Rumana Esp-Societo, berättar att Rumänien var representerat på denna kongress av en delegation anförd av J. Petrin, och RES publicerar dennes rapport till kongressen. Han dröjer vid den långa rad av rumänska propagandister, Andreo Che, Tiberiu Morariu, Praganu, Lucia Atlas mfl, vilka kallats att verka i främmande länder, och han nämner dem som stannade och förde rörelsen vidare till katastrofen, då ordföranden Fiŝer-Galati fick fly till Cypern och andra, bland dem Constantia Beu, arkebuserades.

Nu arbetar man fritt för esperanto, men under svåra betingelser och utan understöd. Betänk, säger talaren, att kriget förstört vårt skolväsen och att landet ånyo räknar 75 % analfabeter!

Pyke Memorial examination estas esperanta ekzameno fondita je honoro al fervora aŭstralia esperantisto J. G. Pyke, iama prez. de Melburna Klubo. Komitatoj en ĉiu aŭstralia ŝtato kolektas ekzamen-amikojn kaj premiojn por ili. La ekzameno estas trapasita de centoj dum la 14 jaroj de ĝia ekzisto.

(La Rondo, organo de Aŭstralia Esp-Asocio)

Aŭstrio. La ŝtata ekzamen-komisiono por Esperanto en Aŭstrio estas restarigita. Estas jam permesate instrui esperanton kiel nedevigan lernobjekton en aŭstria lernejoj. Alfred Berdan skribas pri tio en Aŭstria Esp-Revuo:

Speciale tio instruas nin, ke propagando havas siajn limojn, ĉar nun mankas al ni la sufiĉa nombro de fakaj Esperanto-instruistoj por povi ĉie al lernejoj disponigi instruiston, kie oni volas enkonduki Esperanton.

Tial estu provizore ĝenerale nia plej nobla celo kaj propagando: eduki el nia anaro taŭgajn instruistojn por kursoj, funkciulojn por la organizo kaj por la grupoj lingvon f a k t e posendantajn esperantistojn.

Kie loĝas esperantistoj?

H. C. Magel, Voorbeek 6, Aalst-Waalre (Nederlando) elsendis belaspektan, verdkoloran geografian karton de Nederlando, sur kiu li verdstele markis la urbojn kaj vilaĝojn en kiuj loĝas esperantistoj. La propagandan valoron de tia karto por ekspoziciaj celoj oni certe ne povas pridubi. La dimensioj de la karto estas 36 x 43 centimetroj. Prezo: 0,75 ned. guld. aŭ 6 Rkj.

IEL:s **båda** **årsböcker** **äro** nu utkomna och distribuerade för 1946. Många nya adresser på esperantokon-suler ha tillkommit, men Sverige har inte bidragit med tillräckligt många. Ny uppgift för oss under 1947!

LITERATURO.

La trovita feliĉo, novelo de Tibor Sekelj, 19 paĝoj, ricevebla ĉe Esperanta Asocio de Buenos Aires. Prezo 2 respondkuponoj.

Tibor Sekelj estas redaktoro de Argentina Esperantisto kaj tre konata argentina sportisto, speciale fama per siaj du suprengrimpoj al la plej alta monto de Ameriko, Aconcagua, en la jaroj 1944 kaj 1945.

La prezentatan verketon, kiun tuj post lia lasta alpkonkero presis Eldono "Progreso" en Buenos Aires, li mem karakterizas kiel "novelon legeblan por kursfinintoj". Do malgranda legolibro, eble tasko por ekzameno. — Tamen ĝi estas tiel streĉe rakontita, ke ĉiuj — ne nur kursanoj — povus diri, ke estas bone ke ĝi ne enhavu pli ol 19 paĝojn, ĉar oni tute ne povas formeti ĝin antaŭ ol finlegi ĝin. — Ni rekomendas ĝin por studrond-vespero kaj por vesperlegado ĝenerale, se oni ne timas strangajn sonĝojn dum la nokto.

La vivo, monata organo de "Amikoj de la Homaranismo" nro 1 (okt. 1946) estas stencilita kajero, 12-paĝa, kiu nomas sin "Gazeto por ideologia konstruo kaj internacia edukado".

Post enkonduko, kiu precipe turnas sin al la junularo aŭ temas pri la junularo, venas tri specialkolonoj "La Homo kaj la Vivo", "Mondpolitiko" kaj "Mondekonomio". Plej laste la pacmovado estas la temo, la ĉeftemo, ĉar La Ligo de Homaranismo ja estas movado por daŭra paco.

La adreso de "La Vivo" estas: Limmen (NH) Nederlando. Jarabono 2.50 guldenoj.

La voĉo de Izraelo estas stencilita 5-paĝa kajero de Hebrea Esp-grupo en Bruselo. La kajero nomas sin "informiga bulteno por literaturo kaj politiko" sed havas ne numeron nek daton. La adreso estas: "Nia Esperantista hejmo", Auguste Gaevert str 61, Bruselo, Belgien.

LITERATURA MONDO REAPEROS.

Denove la hungara revuo "Literatura Mondo" vokas siajn iamajn reprezentantojn kaj revendistojn. La eldonejo estas restarigita kun adreso: Literatura Mondo, Hargitta-str. 10, Csakyliĝet, Hungarlando.

ESPERANTA STUDSERVO

Ĝi estas bra att ha i våra kurser — och även för självstudium. Nu finns det hela fyra årgångar att välja på. Var och en kostar 3:50. Rekvirera hos Malmö Esperantoförening, postgiro 38714, så får Ni en hel årgång på en gång.

Aŭstria Esperanto-Revuo, oficiala organo de la aŭstria Esp-movado (Neutorgasse 9, Wien) venis kun nroj 2—3, sept.—okt. 1946, 20 p, poŝformato.

Libera Tribuno, nroj 1 kaj 2 de la nova sudafrika gazeto, kiu anstataŭos la iama "Per unu voĉo" jam aperis. Ĝi nomas sin "Libera Tribuno, sendependa revuo eldonata de Laborista esperanto kunularo", kaj ĝia celo ŝajnas esti esprimita en la du unuaj vortoj "Libera Tribuno".

Same kiel en la Engholma Malgranda Revuo oni invitas al kunlaboro ĉiujn debatemulojn, precipe sur la esperantisma kampo. La kritiko kontraŭ IEL kaj la neŭtraleco ĉiam havas skribantojn, certe pli ol legantojn. Plej interesa estas artikolo pri la gazeta problemo subskribita W. F. Rolt. Ni vere deziras, ke ni havu okazon reveni al tiu artikolo, plena de pripensindaj punktoj, kelkaj eĉ amuze originalaj.

Ĉu metodo? En la kopenhaga esp-bulteno "La Ligo" kunlaboranto proponas novan paragrafon en la kluba regularo: "Por ĉiu membrigo oni ricevas duonjaron liberan kotizon de nia klubo". — Kial ne? Eble ne laŭ la vortoj, sed laŭ la ideo.

Ni volas korespondi kun vi.**FRANKRIKE.**

Esperantista Grupo de Thouars ĉe H. Fiez, 22 Av. Victor Leclerc, Thouars (Deux-Sevres).

S-ino C. Sergueff, 33 Rue Pascal, Clermont-Ferrand (Puy-de-Dôme).

TYSKLAND.

S-ro Walter Krause, Oldenburg Alle 18 I, Berlin-Charlottenburg (46 år telegraftjänsteman).

S-ro Max Rödel, Obere Brücke 9, Hamburg. Amerik. Zone (frimärken och vykort).

S-ro Karl Eberwein, 13 a, Eyb, Hs. Nr. 95 bei Ansbach i/Mfr. (frimärken och vykort).

ENGLAND.

S-ro Siegfried Nowak B 345 239, Storwood Camp. No 73 P. O. W., Mehlbourn Yorkshire.

TJECKOSLOVAKIEN.

S-ino Marie M. Schimmeroá, Upice (önskar lära svenska).

Ing. Ladislav Krojic, Jeronymova str. 1984, Tabor (yrkeslärare).

F. V. Hanzlík, Krenovice 43, p. Bernatrice u Tabora (vykort, frimärken, svensk natur och djurvärld, sport).

50 gekursanoj kaj aliaj membroj de esperanto-klubo en Hradec Králové serĉas plej diversajn gekorespondantojn. Skribu grandamase al via konatulo Josef Vítek, Hradec Králové, Smetanova 952, Ĉeĥoslovakio!

POLEN.

S-ro Sierusz Czerniakow, poczta Pruszcz — Gdanski.

HOLLAND.

S-ro C. Geurts (överlärare), Edam (önskar korrespondens för sina elever).

S-ro H. de Water, Wijzelstr. 203, Scheveningen.

AMERIKA.

S-ro F. H. Sumner (fiŝstudisto), c/o State Game Com., P. O. Box 4136, Portland 8, Oreg., USA.

BULGARIEN.

Mi deziras korespondi kun junuloj kaj junulinoj. Certe respondos S-ro Kiril M. Petkov, Str. Neofit Rilski 40, Sofia.

SCHWEIZ.

S-ro J. F. Farjon, 2, ch. de Roches, Geneve.

SPANIEN.

33-jara dentmeĥanisto deziras korespondi prefere kun sammetiano. Richard de Luna, Paseo de Colon 5 (1o 2a) Barcelona, Spanien.

FINLAND.


Esp-kursoj en Yhteis Somero, Finnlando, komencaj kaj daŭrigaj, deziras korespondi.

ÖSTERRIKE.

S-ro Johano Javernik, kompostisto, Postf. 2, VOITSBERG, Stirio, Aŭstrio.

ALVOKO.

S-ro Todor Kovács, József Attila u. 16. Felsögöd (Hungarujo) petas siajn fervojisto-kolegojn sendi al li esperantaĵojn, priskribon de la fervojista movado. Same li volonte akceptas korespondantojn, rilatajn al folkloro, etnografio kaj entute li kore dankas ĉiun, kiu emas sendi al lia adreso esperantaĵojn, nuntempe tre malfacile atingeblajn en Hungarlando.



Literatura Klubo
STELO-LIBRO
presenterar

VIVO VOKAS

av Stellan Engholm

Vol. IV, 180 sid.

Nedanstående beställningssedel kan användas som anmälan till medlemskap i LITERATURA KLUBO STELO-LIBRO. (Stryk det som ej önskas.)

Till FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Fack 19071, Stockholm 19.

Härmed beställesex. till ordinarie pris av följande böcker vars priser understrukits:

	Ordinarie pris	
	inb.	häft.
Vol. II LA GRANDA AVENTURO	7.25	6.50
Vol. III MI SERĈIS ORON	6.75	6.—
Vol. IV VIVO VOKAS	7.25	6.50

Jag anmäler mig som medlem i LITERATURA KLUBO STELO-LIBRO och beställer de volymer, vars priser understrukits:

	Medlemspris	
	inb.	häft.
Vol. II LA GRANDA AVENTURO	5.75	5.—
Vol. III MI SERĈIS ORON	5.25	4.50
Vol. IV VIVO VOKAS	5.75	5.—

Som medlem förklarar jag mig beredd att köpa 5 volymer i följd fr. o. m. Vol. och om jag därefter önskar utgå, skall jag meddela detta senast 3 månader efter det jag mottagit den fjärde boken.

Namn Datum

Adress

Ort

(De som redan äro medlemmar i Stelo-Libroklubben erhålla VIVO VOKAS automatiskt.)

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Eva Julin, Nytorngsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.
Tel. 42 53 84.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:40. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Box 190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 50 88 05.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

MALMULTEKOSTAJ, FACILE SENDEBLAJ KRISTDONACOJ!

Pergamenobjektoj (paĝmontriloj, grandaj, malgrandaj alumetskatoloj, ktp.), mane pentritaj.

Verda stelo en broŝformo, farita el perloj, aliaj perlobjektoj.

Sendu vian mendon laŭeble plej baldaŭ!

Prezoj:

Verda stelo (tre ŝatata) 2:75, paĝ-montriloj 1:25, grandaj alumetskatoloj 3:50, malgrandaj alumetskatoloj 0:75.

Sendu vian mendon laŭeble plej baldaŭ! Rose Szilágyi, Tredje Villag. 26, Borås.

**Redigeringen av nummer 12 avslutas
den 28 november.**

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet